MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

INFORMILO 9

SEPTEMBRO 2020 Kol. 424/36

xxxx

lingvojn, esperas koni Unesko-n per Esperanto, proponis, ke Unesko eldonu *De ideoj al agoj: 70 jaroj de Unesko* en Esperanto.

Danke al la kunlaboro de afablaj kaj helpemaj Unesko-oficistoj kaj danke al esperantistoj el sep landoj, la paralela Esperanto-ĉina versio de la Unesko-libro estas oficiale eldonita de Unesko kun UEA julie, antaŭ la VK 2020. En tio partoprenis precipe la Esperanta tradukisto kaj antaŭa vicredaktoro de *Unesko-Kuriero* en Esperanto, Andrej Peĉënkin, la iniciatinto kaj ĉefredaktoro Trezoro, vicredaktoro François Lo Jacomo, la reviziantoj (Rob Moerbeek, Michela Lipari kaj Wang Fang) kaj la ĉinlingva traduka kaj revizia teamo de Trezoro. La eldonaĵo, kun Unesko-ISBN 978-92-3-000112-4 kaj UEA-ISBN 978-92-9-017138-6, aperis en la formato 220x210 mm, kun 230 koloraj paĝoj kaj abundaj bildoj sur kuproplata papero kaj kun mola kovrilo.

Tiu ĉi libro estas dediĉita al la sennombraj viroj kaj virinoj, kiuj tion realigis, tra la tuta mondo, asocie aŭ unuope, en Naciaj Komisionoj aŭ Unesko-Kluboj, ĉe la ĉefsidejo aŭ surloke. Unesko estas reto de homoj tra la mondo, ĉiel diversaj kaj unuigitaj de valoroj kaj de sia sindevigo profundigi, laŭ la vortoj de la Unesko-Konstitucio, “la intelektan kaj moralan solidarecon de la homaro”. La libro prezentas rakontojn pri tio, kiel Unesko plenumis tiun ĉi mision, reflektante la profundecon, amplekson kaj efikon de Unesko-agado, por certigi klerigadon por ĉiuj, konservi kaj krei konsciiĝon pri universala kultura kaj natura heredaĵo, por protekti la

parolliberecon, plibonigi ĉiujn sciencojn por ĉies bono, lukti kontraŭ rasismo kaj por dialogo, toleremo kaj socia inkludo kaj por doni povon al knabinoj kaj virinoj en ĉiu socio.

Menciinde estas, ke Carlo Minnaja, komisiita de Esperanta PEN-Centro, zorge kaj tre atente kontrolis la tekston de la libro pli ol kvarfoje kaj donis bonegajn konsilojn. La eksa ĝenerala direktoro Irina Bokova skribis la Antaŭparolon kaj Duncan Charters, Trezoro Huang Yinbao kaj François Lo Jacomo skribis la Enkondukon. UEA kore dankas al ĉiuj menciitaj kontribuintoj de la libro. La libro estos baldaŭ videbla en la ŝrankoj de Unesko kaj mendebla ĉe la Libroservo de UEA.

Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 896

Germanio – Konstanco, parto de la ĉeĥa historio

La urbo troviĝas ĉe la suda bordo de la Boden-lago najbare al Svislando. Tuj ĉe la urbo el la lago elfluas la rivero Rejno. La urbo estas kunligita kun la nomo de Magistro **Johano Huso** (*1371 +1415) (Jan Hus).

Huso venis en la urbon Konstanco la 3-an de novembro 1414 propravole, ekipita per protekta letero de Sigismondo la Luksemburga, kien li venis defendi siajn ideojn antaŭ eklezia koncilio.

Huso estis post 25 tagoj de libera enurba restado enkarcerigita. Entute li estis en kvar malliberejoj. Plej longe li estis en la insula monaĥejo. La plej malbonan tempon li travivis sur la Gottlieben -burgo, kie li estis alforĝita en la subterejo. La juĝ-proceso kun Huso daŭris ok monatojn.

En la urba katedralo, kie li rajtis stari nur ĉe la enirejo sub la ĥorejo, li estis kondamnita, ekspastrigita kaj transdonita al nereligia ekzekut-rajto.

Por la ekzekuto li estis gvidita la 6-an de julio 1415 tra la Gottlieben-pordego.

Post 247 tagoj de turmento li estis forbruligita sur la loka ekzekutejo. Lia cindro estis ĵetita en la riveron Rejno.

Post unu jaro la 30-an de majo estis sur la sama ekzekutejo forbruligita ankaŭ Hieronimo la Praga (Jeroným Pražský), disĉiplo de Johano Huso, kiu estis en Konstanco-deputitaro arestita en majo 1415 kaj ankaŭ kondamnita.

De interreto tradukis J.Rýznarová

Sukcesa VEKIĝo de ILEI

Kun 350 partoprenantoj ni povas paroli pri sukceso, sciante, ke niaj Kongresoj kutime arigas inter 70 kaj 170 personojn. Kun 75 programeroj, ĉiuj malsamaj krom du horoj, spekteblaj en ĉiuj

horzonoj sen distingo, ni povas paroli pri bunta programo diversnivela, de babilado al serioza debato kaj al universitataj prelegoj. Dek koncertoj plezurigis la partoprenantojn. Kun efika prizorgado de la platformo fare de la slovaka firmao E@I sen unu sola paneo, ĉio iris glate kaj pli ol kontentige.

Enhave la konferenco estis fruktodona. Diversaj pedagogiaj spertoj aperis, kontakto inter universitatoj funkcias kaj kuras, novaj ideoj naskiĝis kaj jam estas en fazo de konkretiĝo. Multaj homoj povis revidi geamikojn, saluti fratece kaj babili libere. Brakumoj kaj kisoj vidiĝis surekrane. Do ni povis retrovi konatan kongresan etoson amikan.
Aldoniĝis vidbabilejoj, kun aŭ sen preciza temo, kie la ideoj furoris kaj brilis en libera etoso.

ILEI volas rekrei tian eblon en 2021, kun la espero, ke alveno al Edinburgo eblos por kelkaj vojaĝemaj esperantistoj sen virusaj bremsoj. Do ni nun planas **hibridan kongreson** por ebligi la partoprenon de foraj personoj kaj obstaklataj homoj. Ni bezonos por fari tion du kompetentajn personojn, kiuj kapablos filmi kaj sendi niajn diskutojn kaj prelegojn al la mondo kaj zorgi pri debatebloj tutmondaj. La Estraro de ILEI jam decidis pri senpaga restado por tiuj du teknikaj spertuloj. Ĉar ni diskonigas tiun alvokon en aŭgusto, iu neesperantisto povas kandidatiĝi nun kaj havas 10 monatojn por lerni Esperanton. Ĝis Skotlando la dekan de julio 2021! Ni retrovu nin per la Reto jam nun tuj kaj regule tra la jaro!

Mireille Grosjean, Prezidanto de ILEI

Avino per infanaj okuloj

Avino estas sinjorino, kiu ne havas siajn proprajn malgrandajn infanojn, tamen ŝi ŝatas ilin, kvankam ili ne estas ŝiaj propraj.
Ankaŭ avo estas avino, sed li estas sinjoro. Li iradas kun knaboj kapti fiŝojn kaj rakontas pri fiŝkaptado kaj pri ĉio cetere ebla.

La avinoj devas nenion fari, nur ili vizitadas nin. Ili jam estas maljunaj kaj ne povas multe kuradi aŭ salti. Sed ili kunprenas nin al kermes-foiro kaj devas havi multe da mono, ke ni povu sufiĉe karuseli. Aŭ por ke ili aĉetu cukerlanon por ni.
Kiam ni promenadas kun avino ekstere, ŝi ofte haltas kaj montras al ni belaĵojn, kiel koloraj folioj aŭ kaŝtanoj, raŭpoj kaj papilioj. La avinoj neniam diras „iru pli rapide“.
Ili havas ankaŭ okulvitrojn kaj povas eligi siajn dentojn. Ili scipovas respondi jenajn demandojn, kiel „Kial hundo peladas katojn?“, „De kie alvenas vento?“, kaj „Kie vermo havas kapon?“
Kiam la avinoj legas al ni libron, neniam ili ellasas partojn de teksto kaj ankaŭ ne gravas al ili, ke tiun ĉi fabelon ni jam legis. Ĉiuj deziras havi avinon, ĉar avinoj estas unusolaj maturaj homoj, kiuj havas **liberan tempon por infanoj**...

De interreto tradukis L.Angelová

Paralela Universo – Loke ĉeestu, globe festu

La celo de „Paralela Universo" estas por tiuj homoj, kiuj lernis Esperanton, konatiĝi kun Esperanto-parolantoj. Ĉiuj homoj, kiuj scias Esperanton aŭ interesiĝas pri Esperanto, estas invitataj partopreni.

Kio ĝi estas?
Paralela Universo estas unu-taga festo de Esperanto, okaziĝanta en diversaj lokoj samtempe. Iu ajn en la tuta mondo povas organizi la lokan eventon, prefere meze de aŭgusto**,** de tagmezo ĝis la 6-a posttagmeze. Paralela Universo ekstartis en la jaro 2016.
En la jaro 2017 partoprenintoj laŭ lando, urbo kaj grando: Argentino: Bonaero (12), Mendozo (6); Brazilo: Goiania (10), Recifo (10); Danio: Kopenhago (10); Kameruno: Douala (4); Kanado: Kalgario (12), Londono (4), Montrealo (9), Saguenay (4), Toronto…

En la jaro 2019 en la sanfranciska golfregiono, Kalifornio. Entute 20 esperantistoj vizitis Stanford Universitaton: ili surgrimpis la Prezidanto-Hoover-turon, vizitis la centran placon kun ĝia bela preĝejo, vizitis la universitaton.

Ĉeĥoj kunvenis kun germanoj en Krásná Lípa. Ni promenis tra la bela pejzaĝo de norda Bohemio, grimpis al la belvida turo, piknikis, kafumis kaj precipe travivis belan tagon kun amikoj.

Tiu ĉi-jara Paralela Universo estis la 15-an de aŭgusto kaj la ĉeĥaj esperantistoj renkontiĝis en Prago. Dum la kunveno partoprenantoj krom babilado kaj ludado ankaŭ kolektis monon por Bejruto.

L.Angelová

INFORMILO – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj en Pardubice
Redaktoroj: Jarmila Rýznarová, Ludmila Srbová, Lenka Angelová
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. **466 611 941**
e-mail: **aeh@esperanto-aeh.eu** interreto: **www.esperanto-aeh.eu**
Banka kunligo: Fiobanko, kont-numero de AEH 2801322017, bank-kodo 2010
Bankovní spojení: Fio banka , číslo účtu AEH 2801322017, kód banky **2010**
IBAN: CZ3520100000002801322017 SWIFT/BIC: FIOBCZPPXXX
La jarabono de Informilo **20 €** (en kovertoj), aŭ **10 €** (e-mail)
Roční předplatné Informila **300,-Kč** (v obálkách), nebo 150,-Kč (v e-mailu)
Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (naleznete nad vaší adresou) jako variabilní symbol! Příspěvek svazu AEH v dobrovolné výši.
Kotizo por AEH propravola. Kodo ĉe UEA: aehk-z
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.